

Citaĵoj el la verko *Kun siaspeca spico* de Raymond Schwartz, 2-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 514, 1973.08.15 & 18

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni komencis la prezentadon de la verko de Raymond Schwartz ...*kun siaspeca spico* !, kiun ĵus eldonis Stafeto, kaj kiu estas minejo da spritaĵoj. Ni daŭrigas la legadon de eroj el poemoj kaj prozaĵoj de tiu libro, kiu devus troviĝi en la libraro de ĉiu esperantisto.

A.- Raymond Schwartz ŝatas moketi pri la Esperanto-Akademio. Jen eroj el longa poemo titolita *Vivu do l'Akademi'*!:

Cl.- Certe, ke l'Akademi'
estas kompetenta,
kaj neniam ĝi eraras,
kiam ĝi nenion faras,
tio estas evidenta!

A.- Inter ili estas du,
kiuj scias legi !
Bedaŭrinde, dum kunsidoj,
kiam temas pri decidoj,
oni devas ilin vekti!

Cl.- Tiam ili grumblas:
Nu, kion oni festas?
Tiu, kiu nun al ili
povus per respond' utili,
ĝuste tiam ne ĉeestas!

A.- Konsekvence l'Prezident'
tuj deklaras klare :
Se nenio plu por diri,
estas saĝe hejmeniri,
ni daŭrigos venontjare !

Cl.- Kaj jen **Bona recepto** :
La tuta saĝo de l'vivo
konsistas en tio :
Sen superlativo
profiti de ĉio.

A.- Kaj jen historieto pri la temo **Progreso** :
« Adamo kaj Evo estis solaj sur la Tero. Kaj tamen, unu tagon - neniu scias, de kie –
venis tria homo. Li estis viro. Videble. Kaj li diris al Adamo :

Cl.- «*Mi tre dezirus pasigi unu duonhoron kun via edzino. Ĉu vi bonvolas doni ŝin al mi ?*»

A.- «*Doni ?*» miris Adamo. «*Doni ? Certe ne ! Sed, se temas nur pri unu duonhoro, vi*

"povas lui sin ».

Cl.- « *Lui sin ? Jen bona ideo !* » ekĝojis la tria homo, kaj kun plezuro li konstatis : « *Kiel simple kaj senkonflikte ! Jam komenciĝis la progreso !* »

A.- « *Jes,* » konkludis Adamo, « *progreso dank ' al... **Evoluo !*** »

Cl.- Ĉe Raymond Schwartz oni ofte ludas per ŝanĝo de vokaloj. Jen du eroj el poemo titolita **Vokalaj nuancoj** :

« *Silento valoras oron !* » - *Tio estas moto.*

Ĉiuj silentas. - *Tio estas muto.*

Virino silentas. - *Tio estas mito.*

A.- Multkosta diamanto = [egalas al] 18 karatoj.

Vegetara festmanĝo = 18 karatoj.

Cl.- En 1953 Raymond Schwartz veturis al Londono por ĉeesti la kronadon de la reĝino Elizabeth II-a. Jen kiel li priskribas sian restadon en tiuj festotagoj ; tio en poemo titolita **Coronation** :

A.- Por ĉeesti ĝojojn de 1'kronado
mi alvenis dum la antaŭtago ;
ĉar ne haveblis hotellit',
mi tranokti devis sur aerolit'!

Cl.- Sed aerlito estas ŝtono,
Ŝtonoj estas duraj en Londono,
kia feliĉo, ke sub mi
kuŝis jam sinjoro Smith kun famili'!

A.- Dum la nokto pluvis kaj pluvegis,
ĉiuj malvarmumis kaj tusegis,
unu eĉ diris, pro 1' veter',
ke...*jen tusmiasmo vibras tra 1'aer'!*

Cl.- Kiam fine la maten' alvenis,
tre rapide ankaŭ mi komprenis,
ke pro la densa homamas'
mi nenion vidos dum la preterpas'.

A.- Tre bonvena estis do propono,
kiam iu diris, ke balkono
estas havebla nun ĉe li
kontraŭ pago de kvar pundoj aŭ eĉ pli.

Cl.- Kiam mi sur la balkono staris,
tiu homo sen mister' deklaris :
Estos trankvile ĉirkaŭ vi,
ĉar la procesi' ne pasos tie ĉi!

A.- Mi forkuris de la kanibalo
kaj erare vagis tra l'kvartalo
ne plu sciante, kiel mi
trovos reirvojon al Piccadilly.

Cl.- **Which this street** ? mi petis pri konduko,
tuj respondis voĉo de eŭnuko,
kiu informis, ne sen sprit',
ke mi staras ĝuste apud la **Ka-street**

A.- Tiam kelkaj korteganoj pasis,
kiuj la kronfeston ĵus forlasis,
membroj de l'aristokrati'
kaj la ĉefroluloj de l'diplomati'.

Cl.- Estis dikaj, ĝibaj kaj artritaj,
kaj aliaj same misformitaj,
tute aspektis kvazaŭ ni
defiligus membrojn de l'akademi'.

A.- Nu, mi tamen vidis la kaleŝon,
la kaleŝon de la **Coronation**
kune kun la reĝin' Lisbet' :
... sur l'unua paĝo de la **News-gazet'** !

Cl.- La venontan semajnon ni konklude revenos al tiu libro ...*kun siaspeca spico* ! de
Raymond Schwartz, kiun vi tutcerte deziros akiri.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!